Vivresumaj detaloj:

Abhinav Varma
19/12/1995
Barato
Viro
Studento/esploristo nun

Gxisnunaj eventoj:
IJK-j
Retoso-j
VK
KAEST
TEJO-sciencaj prelegoj
IRIS
KonSciU (el gajnintoj)
Naciaj kaj lokaj eventoj
IJK (2023a, venonta)
UK (2023a, venonta)
Ktp

*

Motivigxletero:

Miajn salutojn, karaj estraranoj,

Kompreneble, vi auxdis pri mia motivigxo kandidatigxi igxi estrarano de TEJO — via fama kaj eminenta tutmonda kaj junulara organizo — cxi jare. Tio, fakte, ne estas malvero. Jen mia motiva letero! Nu, mi estas tre aktiva kaj societema Esperantisto, plene de pasio kaj fervoro, kaj enamigxis al la movado multe pli rapide. Komencinte lerni cxi tiun mirindan lingvon dum la tutmonda pandemia enuado, mi rapide komencis partopreni en eventoj (danke al la Esperantuja retigxo). Gxis nun, mi partoprenis en multaj IJK-j (kie mi bonsxancis sxanci gastigi intervjuon), kelkaj Retoso-j (prelegis, kaj kungastigis interkonan programon), VK (prelegis), Mondovizio, ktp. Rilate al prelegoj — mi provis fari tiujn tiom ofte kiom mi povis, inkluzive cxe KAEST, TEJO scienco, IRIS, KonSciU, ktp. Nu, mi ne havas ja multe da sperto esti membro de iu Esperanta estraro aux sperto pri organizado (krom kelkaj etaj eventoj) — sed tio ne estas difekto, estas anstatauxe forto. Tio estas cxar, kiel la filozofiisto Epikuro diris, “Ju pli la malfacileco, des pli la gloro venki gxin.” La filosofiisto Heraklito ankaux diris, “Ne povas pasxi en la saman riveron dufoje”.

Sed notu, karaj estraranoj, ke mi havas multe da sperto en tiaj cxi roloj ekster de Esperantujo. Oni simple konsideru la multajn universitatajn societojn en kiuj mi rolis kiel prezidanto, vic-prezidanto, sekretario, kasisto, ktp, ktp.

Ho, jes, pri oficoj — cxi fojon, fakte, mi malpli volonte roligxus kiel prezidanto, kasisto, aux iuj tiom gravaj oficoj. Se ekzistas ia gxenerale membra rolo, mi volus kandidatigxi por tio. Ne maltranviligxu, cxar cxi tio indikas nur intereso kontribui per pli fleksaj kaj kreemaj manieroj — kaj eble jam ekzistas iu pli kreema kaj societema rolo (kontraste al administraj). El komisionoj, mi plej sxatas tiujn nomite <<eksteraj rilatoj, edukado, scienco, kulturo, transnaciaj projektoj >> cxefe. El interesgrupoj, pli volonte <<Teknologio>> aux <<universitata agado>>. Kiel klare videblas, miaj interesoj estas vaste kaj fleksemaj. Tio estas nur unu de la kialoj elekti min. Nun, kiam vi pretigxas transdoni torcxon al sekvaj generacioj, vi trankvile ripozus elektinte min, sciante ke la movado estas en la kapablaj manoj de iu samideana paca batalanto kiu ne ripozos, nek ecx priprensos ripozi, gxis la finfina fina venko.

Amike,
Abhinav Varma (Abhi)